

# LA JUNA VIVO

MONATA ORGANO  
POR LA

JUNULARO KAJ  
KOMENCANTOJ



Redakcio kaj Administrado:  
West-Graifdijk (N.H.)  
Nederlando.  
Ĝironumero 209354 Nederlando.  
Tel. 10

Jarabono:  
Nederlando: 0.75 guldeno  
Aliaj landoj: 1 guldeno  
(1 gld. = 2,1 Sv. fr. aŭ 10 fr. fr.)

## PETER PEJNE.

Okazis kelkajn semajnojn antaŭ Kristnasko. Peza nebulo pendis super la akvo kaj la rivero estis plena de naĝanta glacio. Sen nombraj pecoj, grandaj kaj malgrandaj, preternaĝis malrapide. Ni, knaboj, ludis sur la bordo kaj al ni plaĉis la turniĝado kaj moviĝado de la glacio. Ni provis disbati la glacipecojn per longaj bastonoj. Ankaŭ ni riskis fari de temp' al tempo salton sur la glacieron.

Kaj apud ni staris Peter Pejne, mia amiko. Li volis fariĝi maristo. Sed ĵus li revenis el la malsanulejo, kie li longe kuŝis kun grava pulminflamo. Li nun estis tiom resaniĝinta, ke li povos fari en la printempo sian unuan marveturon.

Per ŝipo al Orient-Hindujo li volis marveturi. Multajn belajn historiojn li jam rakontis al ni pri la mirindaĵoj el fremdaj landoj kaj pri la plezuroj de la marista vivo!

Averte li kriis al ni: „Ne faru tion! Ne faru! — Alie malbone finiĝos!”

Ni ridis pri li kaj nomis lin timulo! Kaj Jan Bejers, la plej riskema el ni tri, diris malestime: „Kion do vi faros sur la maro, kiam la ventegoj furiozas kaj la ŝipo balanciĝas, — se vi jam sur la bordo timas?”

„Ha, kion vi scias pri la maro, vi terulo!” rediris Peter. „Sur la maro mi scias kion fari, pli bone ol vi!”

„Nu, venu do, se vi estas viro, kaj ne timemulo!” kriis al li Jan Bejers: „Vidu, knaboj, jen alfloras al ni bela glacipeco. Granda, — tiom granda kiom duona Ameriko! Nun mi estos Kolumbo, kaj malkovros Amerikon! — Jen ĝi venas! — Antaŭen, knaboj! Kiu kuraĝas?” —

Li alrigardis min provoke kaj sen hezito mi kriis: „Mi parto-



prenas!”, ĉar mi ne volis esti malkuraĝulo.

Unu pinto de la glacipecego nun preskaŭ tuŝis la bordon. Jan sursaltis kaj mi sekvis lin. Kaj tie ni ambaŭ staris sur la glacia surfaco, ridante kaj hurakriante!

„Knaboj, forlasu ĝin! forlasu ĝin!” kriis Peter Pejne, kaj li svingis al ni per la brakoj.

„Pli bone vi venu al ni, se vi kuraĝas!” respondis Jan.

Mi vidis, ke Peter kolere pugnigas manon kaj indigne rigardas nin. Sed li ne venis al ni. Obstine li staris tie — kaj tiam subite sin turnis kaj rapide forpaŝis! Ni moke kriis al li kaj postkriis insultojn.....

Dume nia glacipecego naĝis laŭ la bordo kelkan tempon. Ni staris unu apud la alia kaj tre fieris pro nia braveco! Mi rigardis sur la riveron kaj vidis milojn da grandaj kaj malgrandaj glacipecoj fornaĝantaj al la maro..... Sed vidu! — jen nia pecego sin turnis — la pinto tre malproksimiĝis de la bordo kaj larĝa akvostrio faŭkis inter ili! —

„Ho, kio nun okazas al ni?”

Timigite mi alrigardis Jan Bejers.

„Nu, silentu do! — Baldaŭ ĝi ree tuŝos la bordon!” diris Jan.

Kun streĉo ni atentis ĉiun movon kaj turnon de nia insulo. La ronda flanko nun estis direktita al la vojoflanko kaj la pinto estis jam meze en la rivero! Jen ĝi puŝiĝis kontraŭ alia pecego — granda parto derompiĝis! Morte pala pro ektimo mi ekprenis Jan ĉebrate. En nia korpo ni klare sentis la ekskuon. Kion nun fari? Akvostrio, trifoje tiom larĝa kiom nia glacipecego disigis nin de la bordo! Kaj nia pecego naĝis pli kaj pli al la mezo de la rivero pro la forto de la fluo! Tiam nin kaptis terura timo: „Peter! Peter!” mi vokis, „helpu, helpu!” Sed nenia viva estaĵo estis videbla! Ĉiuj laboristoj jam hejmeniris kaj en tia malvarma Decembrovespero certe ne multaj aliaj homoj venos laŭ ĉi tiu vojo. — Kaj Peter? — Kiel Peter povus helpi nin? Li certe jam estas hejme, kaj eĉ, se li aŭdis nin voki, tiu „timulo” tamen ne helpos! Li eĉ ne havis sufiĉe da kuraĝo salti sur la glacieron, kiam ĝi estis proksime de la bordo! Ĉu do li helpos nin, kiam ni estas meze en la rivero?

Nenio sin movis sur la bordo. Aŭdis nin neniu. Kaj la glacipeco naĝadis ĉiam plue! Ondetoj plaŭdis kontraŭ ĝia rando; malforte ĝi balanciĝis — nur malmulte. Kaj ĉie ĉirkaŭe nur glacio kaj nigraj akvoprofundoj. Ĉie ĉirkaŭe la morto!.....

Mi eksentis froston en la dorso. Ni eĉ ne plu riskis nin movi!



Ĉu ne rompiĝus sub ni la glacio pro eta piedmovo, kaj ĉu ni ne malsupreniĝus en la teruran profundon?

Alia glacipecego puŝiĝis kontraŭ nia. Frotiĝis unu kontraŭ la alia kaj de ambaŭ derompiĝis partoj..... La interfrotado kaj la plaŭdado de la akvo estis la sola, kion mi aŭdis. Kiom longe daŭros ankoraŭ ĉi tiu vojaĝo? Ĉu iam ni revidos la bordon? Kaj je kiu flanko de la rivero? Kaj kiam?.....

Ne longe daŭris, kiam la nokto venis, kaj pli kaj pli ni fornaĝis de la urbo. Eble ni poste povos surteriĝi sur iu insuleto kaj tranokti en la libera aero, sen eblo pri hejmeniro. Kaj ĉu do tio ne estus la plej bona, kio povus al ni okazi! Ĉar, se la glacipeco rompiĝus, ni malaperus en la nigran profundon!.....

Mia koro frapis, kvazaŭ ĝi estis krevonta kaj mi daŭre observis la bordon, kiun ni pro la nebulo nur malklare vidis.

Nun la gepatroj sidas en la varma ĉambro; la patro legas gazeton kaj la patrino iom kudras. Ho, ili ne povas imagi kia granda malfeliĉo pendas al ili super la kapo. Ĉu ili jam estas maltrankvilaj pro mia longa foresto? Ho, ke mi estu aŭskultinta al Peter Pejne! Tiu penso ĉiam revenis. Kaj Jan Bejers certe pensis same. Li fikse rigardis al la glaciorando, kaj lia vizaĝo estis pala kiel kreto. — Jen — kio estis tio?..... Rekte antaŭ ni, en la nebulo, estis nigra makulo! Ĉu estis kolono de iu ponto? Se jes, ni estis perditaj. La glacipeco ĝin tuŝos kaj frakasiĝos.

Aŭdu — ia sono! Kio estis tio? Ni pli kaj pli proksime venis al la nigra makulo. — Ne, tio ne povis esti kolono! Estis boato, kaj en ĝi sidis viro, kiu singarde serĉis trairon inter la glacipecoj! — Rekte li venis al ni! Senspire ni atentis liajn movojn. — Jen lia boato tuŝis nian glacipecon. La viro sin klinis kaj ĵetis al ni la ankroĉenon. Tuj antaŭ miajn piedojn ĝi falis.

„Kaptu ĝin!” li kriis. Ni klinis nin kaj alkroĉis nin al la ankro.

„Nun kuŝigu vin!” li komandis kaj obee ni sternis nin sur la glacieron. Firme tenante la ĉenon, mi rampis sur la manoj kaj piedoj ĝis la rando de la glacipeco kaj alkroĉis min al la boato. La ŝipisto sin klinis profunde trans la rando de la boato kaj — helpis min engrimpi la boaton! Tiam Jan Bejers rampis al la boato — jen ni ambaŭ estis en ĝi — Kaj „diable! tio estis peza laboro, kontraŭ la glacio” diris nia savinto, —. Ni mire rigardis lin — kaj — estis Peter! Peter Pejne nin savis! Nenion ni diris. Silente kaj konfuze ni sidis en la boato, kaj Peter remis al la bordo meze inter la glacirompaĵoj: kaj ni eliris kaj Peter ligis la boaton kaj kuniris kun ni. Kaj tiam mi ne plu povis silenti.



„Peter, Peter!” mi diris, „vi ne estas malkuraĝulo! Vi estas el ni la plej kuraĝa!” —

Mirigite li rigardis min.

„Kion vi opinias do?” li diris, „mi ja ne povis lasi vin droni?”

Kaj Jan Bejers diris nenion, sed larmoj fluis el liaj okuloj kaj dum la tuta vojo li ne volis paroli pri Peter Pejne.

Depost tiu tempo mi scias, kio estas braveco, kuraĝo kaj fidelo! Peter Pejne! — Poste mi revidis lin ankoraŭ ofte, kiam li estis maristo sur holanda ŝipo. Pluraj belaj leteroj de li estas en mia leterujo — ĝis kiam la lasta letero, kiun li skribis al mi, alvenis — kelkajn tagojn antaŭ lia morto. Kiel piloto li perdis la vivon en terura vetero — por aliaj! Tamen kiam mi aŭdas pri miriga braveco sur la tero aŭ la akvo, tiam mi pensas pri vi, mia kara Peter Pejne!

El la holanda: VANE.


### ĈASKORNO.



Tra la mon-tar', kaj en ar-bar' so-na-das korn-blo-



vad', so-na-das korn-blo-vad'; kun for-ta vok' al



ĉi-u lok' re-so-nas trumpetad' re-so-nas trumpetad'.

Koloron pli	Per trankvilec'
odoron ĝi	kaj vivgajec'
havigas al natur'; 2x)	pro tiu melodi' (2x)
kaj riveret'	pleniĝas kor';
al la trumpet'	ĉagren', dolor',
respondas per murmur' (2x)	nun iras for de mi. (2 x)

Traduko de J. Ziermans.

el: „Esperanta Kantokolekto”, eldonita de Vink.

La libreto estas mendebla ĉe la red. „La Juna Vivo”, prezo: 0,25 gld. aŭ du respondkuponoj.



## BIRDOJ EN NIAJ ĜARDENOJ.

En la printempo la granda paruo, mia vintrogasto, malaperis, kaj tuj poste la malgranda, blua paruo komencis purigi la nestkesteton. Ĝi laboris la tutan tagon, forigis per la beko ĉiujn malpuraĵojn kaj baldaŭ montriĝis, ke ili estas duope: la virparuo, bluega kaj flavega, kaj ĝia edzineto, nur blueta kaj flaveta.

Post la granda purigado ili konstruis sian neston, kaj baldaŭ mi rimarkis, ke ili havas ovojn, ĉar la virparuo ja ĉiufoje alflugis kun nutraĵo por la ino. Ŝi prenis la manĝaĵon per la beko el tiu de sia edzo. Sekvis ankoraŭ kelkaj tagoj, tiam la gepatroj flugis la tutan tagon tien kaj reen por nutri la idojn, kiuj kriis kaj kriis, kaj ŝajnis esti ege malsataj.

Fine venis la tago, en kiu la idoj povis flugi el la nesto. Mi sidiĝis tuj apud la arbo kaj vidis, ke la gepatroj ĉiam kun raŭpo en la beko flugas al la nesteto, ne donante la frandaĵon al la idoj, kiuj kun malfermitaj bekoj aperis antaŭ la enirejo. Mi komprenis, ke ili volas devigi la idojn forlasi la neston kaj jen, la unua elflugis. Sekvis dua, tria, kvara, kaj mi nombris en kelkaj minutoj dek du flavbluetajn buletojn. Ili kolektiĝis en arbo de la apuda ĝardeno, senĉese kriante kune kun la gepatroj, ĉar ..... restis ankoraŭ unu ido en la nesto. Malesperaj estis la gepatroj; ili flugis ripetfoje de la arbo al la nesto, kie restis la malkuraĝuleto. Fine ĉi tiu flugis al proksima branĉo, klopodis flugi al la aliaj, sed ho ve, ĝi estis tro tima kaj falis kiel ŝtono antaŭ miaj piedoj. Mi tuj prenis la etulon en la manojn kaj metis ĝin sur la tegmenton de la nestkesteto. La aliaj kun la gepatroj forflugis. La krioj pli kaj pli mallaŭtiĝis, baldaŭ mi ne plu aŭdis ilin. La gepatroj revenis ankoraŭ unufoje, logante kaj kriante, sed la malfeliĉulo restis sur la nestkesto. Fine ankaŭ ili forflugis kaj ne plu revenis. Mi klopodis nutri la dektrian, sed ne sukcesis; ĝi fermis la bekon, kiam mi volis doni ion al ĝi. Ĉar noktiĝis, mi metis la birdeton en la neston. La sekvintan matenon mi forprenis la tegmenton de la nestkesteto kaj trovis — la mortintan birdeton.

Antaŭ ol mi finos mian verkaĵon mi volas doni gravan konsilon al ĉiuj, kiuj volas zorgi pri la birdoj dum la vintro. Multaj el vi kompreneble scias, ke vintre la birdetoj bezonas nian helpon. Sed ĉu vi scias, ke ili krom nutraĵon bezonas ankaŭ trinkaĵon?

Kiam neĝas aŭ hajlas la birdoj havas sufiĉan trinkaĵon, sed kiam estas klara, frosta vetero, kaj ĉie la akvo glaciigas, vi donu al ili





pelveton da trinkaĵo. Por malhelpi, ke ankaŭ ĉi tio glaciigo, vi zorgu, ke ĝi restu iom varma. Prenu tial florpoton, faru en ĝi du aŭ tri truojn kaj metu en ĝin varmigilon (p.e. teovarmigilo aŭ kandel-eto). Sur la poton vi metu la pelveton. Tiel la akvo ne frostiĝas. Zorgu tamen, ke ĝi ne estu tro varma, nur varmeta!

Vi spertos, kiel dankaj estos la birdoj por tia helpo!

Wassenaar, Nederlando. El miaj propraj spertoj A. E. S. M.

### ENIGMOJ.



a, a, a, a, b, ĉ, d, e, e, f, i, k,  
k, m, m, m, n, n, n, o, o, o,  
o, o, p, r, r, u.

La vortoj signifas: en la meza,  
horizontala vico: tagon

Vertikale: 1. Prepozicion. 2.

Fluidaĵon. 3. Prepozicion. 4.

Kreskaĵon. 5. Finon. 6. Gra-

van personon. 7. Korpoparton.

a, a, b, d, d, d, g, h, h, i, i, i,  
i, n, n, o, o, o, o, o, r, r, t, t, u.

La vortoj signifas: en la mezaj  
diagonalaj vicoj: birdon.

Horizontale: literon, prono-  
mon, beston, birdon, vestaĵon,  
posteulon, literon.

B. REICHBERG — RIGA.

**Inter la sendintoj de la ĝustaj solvoj ni disdonos 3 premiojn. Ni akceptos solvojn ĝis la unua de Marto.**

**La solvoj el No. 5.**

2. Multaj solvoj estis eblaj.

3. Nazo — vazo — gazo — bazo.


Jen la nomoj de la personoj, kiuj ricevis  
premion: S.ro Meester, Stomporetoren, Ne-  
derlandio; S.ino Haond, Chateaurous,  
Francujo; S.ino Luyting-Vos v. Zon, Zd.  
Scharwoude, Nederlando; S.ro Stofberg,  
Rijswijk, Nederlando.








VUL DIE KAN EVEN PIET !



DAT ZAL NOG WEL WAT DUREN



PIET DENKT NIET AAN DE STROOP.



ZAL JE DAN NOOIT AAN JE WERK DENKEN?

### LA SUBSKRIBOJ DE LA BILDOJ:

1. Plenigu la kruĉon, Petro! 2. Certe daŭros longe!
3. Petro forgesas la siropon. 4. Ĉu vi neniam atentos vian laboron?

Rakontu la enhavon kaj sendu la verkaĵon al: Red. „La Juna Vivo”, West-Graffdyk, NH., Nederlando.

Inter la sendintoj de la plej bonaj verkaĵoj ni disdonos 3 premiojn. Sendu viajn verkaĵojn antaŭ 1 Marto.

El: „T. v. d. Brink en Th. Lancée. Onze eigen taal”, J. B. Wolters, Groningen—den Haag—Batavia.



## DAŬRIG-KURSO.

## A. Aŭstria Humoro.

Foje kunvenis du malnovaj amikoj.

Diras la unua: „Saluton.” Diras la dua: „Saluton.” Diras la unua: „Joĉjo, hieraŭ mi preskaŭ vidis vian fraton.” Diras la dua: „Ne parolu tiel malsaĝe: preskaŭ vidis! **Aŭ** vi vidis lin, aŭ vi ne vidis lin.” Diras la unua: „Mi ne vidis lin, sed mi ankaŭ ne ne vidis lin. Via frato estas ja la servisto n-ro 49?” „Jes,” diras la alia „mia frato estas la servisto n-ro 49.” „Nu,” diras la unua, „mi vidis la serviston n-ron 48.”

el „FACILAJ ESPERANTAJ LEGAĴOJ.”

## B. Nenio nova sub la suno.

Greko kaj Izraelido preparolis la eltrovaĵojn de la lasta tempo. „Ho,” diris la Greko, „la Eŭropanoj fieras pri **ĉiaj** elpenaĵoj, pri kiuj ili **asertas**, ke ili estas novaj. Tamen, antaŭ kelkaj tagoj oni **estis fosantaj** en Grekujo kaj je profundo de dudek metroj oni trovis longan **draton**.”

„Nu, kion tio pruvas?”

„Kion tio pruvas? Tio **signifas**, ke antaŭ dumil jaroj la Grekoj jam konis la telegrafon!”

„Ho, mi povas rakonti al vi ion multe pli **trafan**. Apud Jeruzalemo oni fosis eĉ pli ol kvindek metrojn kaj trovis tie ..... nenion.”

„Kaj kion signifas tio?”

„Ĉu vi ne komprenas? Vere, ruza vi ne estas! Tio pruvas, ke antaŭ dumil jaroj la Izraelidoj jam konis la sen-**fadenan** telegrafon!”

Francujo, Parizo.

J. LEHELLE.

**C.** La fosantaj viroj — la viroj estas fosantaj; la dancanta urso — la urso estas dancanta; la ludantaj infanoj — la infanoj estas ludantaj; la ridanta knabino — la knabino estas ridanta.

**D.** **Inda**, leg-**inda** libro, rid-**inda** knabo; vid-**inda**; kredinda, bedaŭrinda, aminda, kompatinda, rimarkinda.

I. Lernu bone la novajn vortojn en A, B, C, D.

II. Traduku A, B, C, D en vian gepatran lingvon.



III. Rakontu per propraj vortoj „Aŭstria Humoro”.

IV. Respondu al jenaj demandoj:

Pri kio parolis la Greko? Pri kio la Eŭropanoj fieras? Kiel la Greko pruvis, ke antaŭ dumil jaroj oni en Grekujo jam konis la telegrafon? Kaj kiel la Izraelido pruvis, ke liaj prapatroj jam antaŭ dumil jaroj konis la senfadenan telegrafon?

Uzu en frazoj: atendi — atenti, provi — pruvi, sento — **senco**, super — supre, **fervora** — **favora**, pezi — pesi, **nobla** — **nobela**, festo — vesto, precipe — **principe**, ĵus — ĝusta, pagi — paki, serĉi — ŝerci, vesto — **veŝto**.

### LERNADO SEN FRUKTOJ NE RESTAS.

**Barbiro** trovis en la ĝardeno junan **sturnon**, kiu ankoraŭ ne bone povis flugi. Li metis la birdeton en kaĝon kaj nutris ĝin pli ol sufiĉe. La birdeto iĝis tiel **malsovaĝa**, ke ĝi saltetis tra la ĉambro kaj eĉ manĝis el la mano de la barbiro.

Ĉi tiu provis instrui al la sturno kelkajn vortojn, kaj li bonege sukcesis. La birdo estis eksterordinare lernema. La barbiro mallongigis la flugilojn, ĉar estus domaĝe, se la besto forflugus.

La klientoj ĉiam havis multan plezuron pro Joĉjo, tiel la mastro **baptis** ĝin. Se ili demandis ion al la birdo, ĝi kompreneble donis la plej **absurdajn** respondojn. Ho, kiom ofte la klientoj ridegis.

Iam, subite Joĉjo saltetis eksteren. La barbiro dum kelkaj semajnoj ne detranĉis la flugilpintojn kaj la birdo flugis for. Baldaŭ ĝi troviĝis (trovis sin) ekster la vilaĝo ĉe aro da **fringoj** kaj sturnoj. Ĝi kunflugis kun ili kaj baldaŭ ili atingis kampon. Tamen ili apenaŭ estis sur la tero, kiam **reto** falis sur ilin. Kiom ektimis Joĉjo! La birdkaptisto alkuris kaj mortigis la bestojn unu post alia. Subite Joĉjo sentis, ke oni ekprenas ĝin. Pro timo ĝi kriis: „Ve, ve, **sapumu**, sapumu!”

La birdkaptisto vere ektimis. Li estis kliento de la barbiro kaj tuj komprenis, kiu estas la klera sturno.

„Ĉu estas vi, Joĉjo?” li diris. „Jes, jes, mi estas Joĉjo de la barbiro. Ne tranĉu! Ĉu vi aŭdas, ne tranĉu!”

La viro singarde kaptis la sturnon, dirante: „Joĉjo, Joĉjo, kiel vi venis ĉi tien?”

„En societo, en societo!” la birdo respondis.



„Tion mi vidas!” diris la kaptisto. „Mi alportos vin al via mastro.”

Kiom ĝoja estis la barbiro, revidante la birdon.

„Certe, certe,” li diris, „lernado sen fruktoj ne restas!”

A. Legu kelkfoje la rakonton kaj respondu al jenaj demandoj:

Kion la sturno lernis? Kiujn la birdo amuzis? Kial la klientoj tiom ridis? Kio okazis iun tagon? Kial la birdo povis forflugi? Al kiuj birdoj flugis la sturno? Kiel oni kaptis la birdojn? Ĉu la birdokaptisto rekonis la sturnon? Kion faris la birdokaptisto? Ĉu la barbiro ĝojis, revidante la sturnon?

B. Rakontu la enhavon per propraj vortoj.

C. Traduku jenajn proverbojn: Kiu ne riskas, tiu ne gajnas. — Komenco bona, laboro duona. — Post sufero venas prospero. — Jeti perlojn antaŭ la porkojn. — Ne ŝovu la nazon en fremdan vazon.

D. Traduku: Legi — leg-**ebla**, vidi — vid-**ebla**, manĝi — manĝebla, venki — **venkebla**, forgesi — neforgesebla, **eviti** — neevitebla, pagebla, **luebla**, komprenebla, **respektebla**, **akirebla**, atingebla, nekredebla.

E. Uzu en frazoj: **pigo** — **piko**, pasi — paŝi, **pasto** — **paŝti**, placo — plaĉo, prezo — **presi**, **rifuĝi** — **rifuzi**, **regi** — reĝi, reservo — **rezervo**, **roso** — rozo, **sago** — sako, **segi** — **seka**, prava — brava, presejo — preĝejo, muso — muŝo, **tusi** — tuŝi.

---

## KOMUNIKOJ PRI LA GAZETO.

La esperantistaj grupoj en jenaj lokoj enkondukis „La Juna Vivo”:

**Anglujo:** Bishop Aukland. (dua jaro).

**Cehoslovakujo:** Plzen (dua jaro). Zeleznik (dua jaro).

**Nederlando:** Alkmaar (dua jaro), Amsterdamo (infankurso, dua jaro), Broek in Waterland (dua jaro), Helder (dua jaro), den Burg, Langerheys (dua jaro), de Ryp (komenckurso), Rauwerd (dua jaro), St. Pancras (komenckurso), Sliedrecht (dua jaro), West-Graafdyk (infankurso kaj por plenaĝuloj, dua jaro), Wormerveer (dua jaro). Stadskanaal (dua jaro).

En „Lumo” (Nov. '35) aperis: „La kvar griloj de la bakistino”, el „La Juna Vivo”, Sept. '35. En „De Proletarische Vrouw”: „Antaŭ kelkaj tagoj mortis Heroino .....” el „La Juna Vivo”, Nov. '35. En la angla gazeto Woman's Outlook”: „Militema Filo”, el „La Juna Vivo”, No. II '34.



## KORESPONDADRESOJ.

**Anglujo:** Kelkaj gekomencantoj (16—19) deziras korespondi kun samaĝuloj. Oni ne povas promesi respondon post Marto '36. Skribu al: F.ino V. C. Nixon, 183 Woodlands Park Road, Bourneville, Birmingham.

**Bulgarujo:** Geesperantistoj, emaj fari grandpezan helpon al la propagando de Esperanto, sendu ĉiuspecajn esperantaĵojn al: Boris Simeonov, Str. Zutibrod, 6, Sofia II.

**Francujo:** Du lernantoj, dekjaraĝaj, deziras korespondi kun Nederlandan-(in)oj. Skribu al: S.ro Miguière, „Amenemhat II”, 31 Avenue de la respubliko, Igny (S. & O.).

**Germanujo:** 21 jara samideano deziras korespondi kun gesamideanoj, ankaŭ pli junaj aŭ pli aĝaj, el ĉiuj landoj. Precipe pri nia movado, ties organizo, la popolvivo kaj pri la privataj vivo kaj pensoj (fotoj). Adreso: W. Brade, Bahnhofstrasse 71, Döbeln. (respondo certa!)

**Hispanujo:** Dudek tri lernantoj, 18—23 jaraĵ, deziras korespondi kun ĉiuj landoj. Certe respondos. Adreso: S.ro Carlus Marzá, Strato Ruiz Zorilla 27, Utiel, Valencia.

**Hispanujo:** Tri gajaj, sed seriozaj fraŭlinoj deziras korespondi kun ĉiuj landoj, pri ĉiuj temoj, per leteroj kaj poŝtk. il. Adresoj: Doljo Romanach, str. Iglesias; Margareco Berta, str. Josep Sabater; Demetrio, Mares, str. E. Figuera (Barberia); ĉiuj en Roses (Girona).

**Hispanujo:** Du junaj fraŭloj (18 jaraĝaj) deziras korespondi. Adresoj: José Collado, Virgen Pilar 12, Terrassa (Kat.); Maximo Buisán, Virgen del Pilar 8, Terrassa (Kat.).

**Japanujo:** S.ro Tokusabro Ŝimazu, No. 1861 Koganei Kitatama, Tokio-Fu, deziras korespondi kun eŭropaj samideanoj.

**Nederlando:** 26-jara esperantisto deziras korespondi kun ĉiuj en la mondo kaj pri ĉiaj temoj (ne-politikaj). Li ankaŭ volonte ricevus bildkartojn por sperti kie troviĝas „La Juna Vivo”. Resp. estas garantiata. Skribu al: S.ro R. H. Knip, Koppelstokstr. 37, Utrecht.

**Nederlando:** 13-jara knabo deziras interŝanĝi poŝtmarkojn. Ĉiu, kiu sendas al li 50 poŝtmarkojn, li rekompence resendos 50 aliajn poŝtmarkojn. Adreso: Piet Meurs, West-Graffdyk, N.H.

**Nederlando:** S.ro C. Mulder, M. v. Heemskerkstr. 53 H., Heemskerk, deziras korespondi.

**Nederlando:** 15 jara knabo deziras korespondadi kaj interŝanĝi poŝtmarkojn kun ĉiuj landoj. Certe respondos. Adreso: H. Stielckel, Gasthuisvest 31 rood, Haarlem.


**Nederlando:** F.ino C. B. v. d. Meulen, deziras korespondi. Adreso: Johan Cousetstr. 26, boven, Diemen.

**Nederlando:** 21 jara Holandano deziras korespondi kun geeksterlandanoj pri diversaj temoj. Adreso: S.ro Jan Tromp, Middenweg 98, Uitgeest.

**Danujo:** 18 novaj Esperantistoj (14 fraŭloj kaj 4 fraŭlinoj) deziras korespondi. Adreso: S.ro A. Fr. Jensen, Sejerslev, Bregsförening Mors.

**Maroko:** 23 jara fraŭlo dez. kor. pri ĉiuj temoj kun gesocialistoj de ĉiuj landoj, interŝanĝi poŝtk. il., poŝtmarkojn, fotojn. Adreso: Jean Apcher, Bd. Circulaire, Quartier Ras Aguil, Meknes, Maroc.





### LA UNUA LECIONO.

- |             |              |                 |
|-------------|--------------|-----------------|
| 1. muso.    | 9. narciso.  | 17. tablo .     |
| 2. kato.    | 10. banano.  | 18. Amsterdamo. |
| 3. koko.    | 11. piro.    | 19. Parizo.     |
| 4. bovo.    | 12. pomo.    | 20. Londono.    |
| 5. leono.   | 13. citrono. | 21. Stokholmo.  |
| 6. rozo.    | 14. melono.  | 22. Berlino.    |
| 7. tulipo . | 15. forno.   |                 |
| 8. violo.   | 16. benko.   |                 |

1. Kato estas besto. 2. Ankaŭ bovo estas besto. 3. Kato kaj bovo estas bestoj. 4. Ankaŭ muso, koko kaj leono estas bestoj. 5. Rozo estas floro. 6. Ankaŭ tulipo estas floro. 7. Violo, tulipo kaj rozo estas floroj. 8. Tablo estas meblo. 9. Ankaŭ benko estas meblo. 10. Forno, benko kaj tablo estas mebloj. 11. Pomo estas frukto. 12. Ankaŭ citrono estas frukto. 13. Piro, banano kaj melono estas fruktoj. 14. Amsterdamo estas urbo. 15. Ankaŭ Parizo estas urbo. 16. Londono, Stokholmo kaj Berlino estas urboj.

- |                        |                      |
|------------------------|----------------------|
| 17. Kio estas pomo?    | Pomo estas frukto .  |
| 18. Kio estas Parizo?  | Parizo estas urbo.   |
| 19. Kio estas benko?   | Benko estas meblo.   |
| 20. Kio estas narciso? | Narciso estas floro. |



- a. Lernu la vortojn.
- b. Kopiu la frazojn en vian kajeron.
- c. Traduku la lecionon en vian gepatran lingvon.
- d. Respondu al jenaj demandoj:

Kio estas kato? Kio estas forno kaj benko? Kio estas banano kaj piro. Kio ankaŭ estas fruktoj? Kio estas Parizo? Kio estas tablo? Kio ankaŭ estas mebloj? Kio estas leono kaj koko? Kio estas melono? Kio estas urboj? Kio estas Londono kaj Amsterdamo? Kio estas bestoj?

(La instruisto demandas. La lernantoj respondas ĥore aŭ unuope).

### LA DUA LECIONO.

23. karto.	31. bildo.	39. ringo.
24. vazo.	32. muro.	40. bastono.
25. libro.	33. kuseno.	41. plado.
26. taso.	34. planto.	42. planko.
27. sub-taso.	35. fenestro.	43. oreloj.
28. glaso.	36. fenestro-breto.	44. vosto.
29. ŝranko.	37. poto.	45. tubo.
30. tir-kesto.	38. kurteno.	46.. rando

1. La floroj estas **en** la vazo. 2. La fruktoj estas en la plado. 3. La planto estas en la poto. 4. La tirkesto estas en la ŝranko. 5. Ankaŭ en la tablo kaj forno estas tirkesto. 6. La akvo estas en la glaso. 7. La **teo** en la taso. 8. La **folioj** estas en la libro. 9. La glaso estas sur la tablo. 10. La **karbo** en la forno. 11. La vazo, la taso, la subtasoj kaj la libroj estas sur la tablo. 12. La kusenoj estas sur la benko. 13. La plado kaj la vazo sur la ŝranko. 14. La tablo **staras** sur la planko. 15. Ankaŭ la forno, la benko, kaj la ŝranko staras sur la planko. 16. La karto **pendas** sur la muro. 17. Ankaŭ la bildoj pendas sur la muro. 18. La kurtenoj pendas **antaŭ** la fenestroj. 19. La tablo staras antaŭ la ŝranko. 20. La poto staras sur la fenestrobreto. 21. La randoj **de** la tablo. 22. La randoj de la ŝranko, la forno, kaj la benko. 23. La tubo de la forno.

### ATENTU!!!

Ciu abonanto aŭ grupo havas la rajton enpresigi senpagan korespondadon unufoje en la jaro.



24. **Kio** estas en la vazo?     **La** floroj estas en la vazo.  
 25. **Kio** estas sur la tablo?     **La libroj** estas sur la tablo.  
 26. **Kie** estas la kato?     La kato estas **sur la planko**.  
 27. **Kie** estas la urboj?     La urboj estas **sur la karto**.
- a. Lernu la novajn vortojn. (Ĉiu kursano havas notlibron en kiun li skribas la vortojn kun traduko!).  
 b. Kopiu la frazojn en vian kajeron.  
 c. Traduku la lecionon en vian gepatran lingvon.  
 d. Respondu al jenaj demandoj:
1. Kio estas sur la tablo?     Kie pendas la bildoj?
  2. Kio pendas sur la muro?     Kie estas la bastono?
  3. Kio estas antaŭ la fenestro?     Kie pendas la kurteno?
  4. Kio estas en la vazo?     Kie staras la forno?
  5. Kio estas en la taso?     Kie staras la tablo?
  6. Kio estas en la glaso?     Kie estas la tirkestoj?
  7. Kio estas en la plado?     Kie estas la kusenoj?
  8. Kio estas en la forno?     Kie estas la karboj?
  9. Kio staras antaŭ la ŝranko?     Kie estas la potoj?

Kio estas **tio**? (La instruisto montras per bastono la objektojn, kiujn la kursanoj jam lernis. Li demandas: „Kio estas tio?” La lernantoj hore aŭ unuope respondas: „Tio estas tablo, fenestro, muro, k.t.p.”).

## SOCIETA LUDO.

Iu en la societo ĵetas pilkon al alia persono, nomante iun simplan objekton. Tiu, al kiu li ĵetis la pilkon, devas tuj diri alian vorton, kiu kompletigas la antaŭe diritan vorton. Ekz.: fingro — ringo, nazo — tuko, birdo — kaĝo, floro — vazo, ktp. Kiu en tri sekundoj ne trovis konvenan vorton, devas doni garantiaĵon al la gvidanto.

(Garantiaĵo estas malgranda objekto, ekz.: ringo, poŝtuko, ŝlosilo, kraĵono. Kiam la gvidanto havas kelkajn garantiaĵojn, li kaŝas ilin, prenas unu en la manon, kaj demandas: „Kion faru la posedanto de ĉi tiu objekto?” La ĉeestantoj diru iun humoraĵon, ekz.:

Priskribi beston; kun kovritaj okuloj levi ion de la planko; paroli frazon en kiu ne estas la litero r; diri flataĵon (konsilon) al ĉiu kunludanto.

Se la posedanto plenumis la postulon, li ricevas sian garantiaĵon).

West-Graafthijk.



**JARKOTIZO:**

Ameriko: 0,70 dol.; Aŭstrio: 3,20 ŝil. Britujo: 3 ŝil.; Belgujo: 17 fr. fr.; Bulgarujo: 50 lev.; Ĉeĥoslovakujo: 16,50 Kĉs.; Danujo: 3 kr.; Estonio: 2,50 est. kr.; Finnlando: 30 finn. mk.; Francujo: 10 fr. fr.; Germanujo: 1,75 M.; Hispanujo: 5 pes.; Italujo: 8,3 ital. lir.; Japanujo: 2,50 jap. jen.; Jugoslavio: 30 din.; Latvio: 2,1 l.; Norvegujo: 2,7 kr.; Polujo: 3,6 zl.; Portugalujo: 15 port. esk.; Svedujo: 2,70 kr.; Svisujo: 2,1 sv. fr.

**KURSGVIDANTOJ!!!**

Vi deziras por viaj lernantoj mal-karan, praktikan esp. lego- kaj lernolibron?

Mendu tuj la unuan, binditan jarkolekton de „La Juna Vivo”, (200 paĝa libro en arta kovrilo). La prezo estas nur: 1,6 Sv. fr. = 0,75 gld. Grupoj kaj abonantoj ricevas rabaton.

**„FLORETOJ”**

Porinfanaj Rakontoj  
tradukitaj de la

„**VENDREDA KLUBO**”  
en Winschoten  
(Nederlando)

Kun multaj koloraj kaj nigraj  
bildoj

de C. Jetses

prezo ..... 0.70 ned. guld.

Aĉetebla en ĉiu librejo kaj ĉe la  
eldonisto:

**J. B. WOLTERS**

Groningen — Den Haag  
Batavia.

**AL NIAJ ABONANTOJ!**

Ni afable petas tiujn abonantojn, kiuj pagis sian abonkotizon ĝis Jan. '36, ke ili kiom eble plej baldaŭ pagu por la venonta jaro!

**URĜA PETO!**

Estas kelkaj eksterlandaj abonantoj, kiuj ankoraŭ ne pagis sian abonkotizon ekde Julio '35. Ni urĝe petas ilin, baldaŭ sendi la monon al la peranto en sia lando. (Vidu paĝon 96).

Subtenu La Junularlaboron, mendu viajn librojn ĉe la redakcio de „La Juna Vivo”!



**REKLAMTARIFO:**

1 paĝo: 15 gld.; ½ paĝo: 8 gld.; ¼ paĝo: 4,5 gld.; ⅛ paĝo: 2,5 gld.

**PAŜO POST PAŜO.**

Een volledige Esperanto-leergang  
door

J. W. Minke en F. Boom-de Vries

1ste deeltje (150 pag.) ..... f 0,75

2de deeltje (208 pag.) ..... f 0,95

Verschenen bij:

N.V. Uitgevers Mij. van Dishoek

**Verkrijgbaar bij de redactie van  
„La Juna Vivo”.**

**NE FORGESU**

ke la unua bindita jarkolekto  
de

**„LA JUNA VIVO”**

estas la plej valora kaj malkara

**INSTRUILO.**

Ĝi vekas la intereson de

**lernantoj kaj progresintoj!**

**Mendu tuj!!**

Prezo: 1,6 Sv. fr. = 0,75 gld. Grupoj  
kaj abonantoj ricevas rabaton.

**„Franca Esperantisto”,** oficiala organo de la Societo Franca por la Propagando de Esperanto, Ĉefkunlaborantoj: S.roj Archdeacon, Bastien, Cou-teaux, Schwartz, Corret, Petit.

Abonprezo por unu jaro: 25 francaj frankoj; provekzemplero kontraŭ I respondkupono, al F.ino Bonnet, 12, place d'Anvers, Paris IX.

Poŝtĉekkonto: Paris 669—74.

Kun vera ĝojo ni eksciis pri la geedziĝo de niaj karaj amikoj:

**NEL DE JONG (Ned.)**

kaj

**BIRGER KARLSON (Sved.)**

Ni deziras al niaj geamikoj ĉion bonan. (Ilia adreso: Rösen 9, Amal, Svedio.)

Abonu **„Verda Revuo”.** Sendependa gazeto pri arto, scienco kaj amuzo. Aperas monate. Jarabono 1 guld. Mendebla ĉe la administrejo: Wien VII, Hermannsgasse 31/26, Aŭstrio, kaj ĉe la redakcio de „La Juna Vivo”, West-Graffdyk, (NH), Nederlando.

Abonu tuj la monatan revuon  
**„FLANDRA ESPERANTISTO”**

Interesa enhavo; facile komprenebla lingvo; aktuala, malmultekosta. Jarabono: 25 frankojn = 1,25 gld. Novaj abonantoj anoncu sin ĉe: Flandra Ligo Esperantista, Kortryk. Poŝtĉeko: 2321.50.

**La Sepa Flandra Kongreso de Esperanto** okazos en Gent, 30 Majo-1Junio. Multaj rabatoj por eksterlandaj vizitantoj. Oni petu informojn ĉe la Organiza Komitato, Raapstraat 82, Gent. Ĉiuj samideanoj bonvenaj.

Miaj geamikoj Auraĵo (R. do Arco da Carravathis 191, Lisbono, Portugalujo) profunde ĉagreniĝis pro la morto de sia plej kara filineto.

**A. H. v. LOON (Roterdamo).**

**ATENTU!!!**

Ĉiu, kiu varbas 5 novajn abonantojn je nia revuo, ricevos donace „La Unuan Jarkolekton” de „La Juna Vivo”. Do multvaloran libron de proksimume 200 paĝoj.